

1963), membro de la medicina akademio, kio koncernas la ridindigon de la soveta biologio. Kontraŭe al la franca kuracisto *Louis Pasteur*, laŭ kiu "omne vivum ex vivo", ĉiu vivulo devenas el vivulo, ŝi anoncis ke ŝi sukcesis produkti vivulon el neviva materio. En 1950 *Lepešinskaja* ricevis la *Stalin*-premion.

Spite de ĉiuj kontraŭaj fanfaronadoj de la neokreadistoj, komence de la 21-a jarcento ene de la naturscienco la evolucio estas la reganta doktrino. Laŭ la formulado de la molekul-biologo *Theodosius G. Dobzhansky*, ukraino elmigrinta en Usonon, "en biologio ĉio havas sencon nur en la lumo de la evolucio" (1964). La abundaj diferencoj de opinioj, la profesiaj diskutoj koncernas nur detalojn kaj la eblajn aplikojn. La fondintoj kaj disvolvintoj de la evolucia teorio sendube meritas esti rekonitaj kaj aprezataj. Kaj se necese, estas nia devo interveni kontraŭ la nescienca idoligo, kontraŭ la malamik-imagon fabrikanta demonigo, kaj kontraŭ la postmoderna senheroigo.

Selektitaj referencoj

Buican, Denis (1987). *L'évolution et les évolutionnismes*. (La evolucio kaj la evoluciismoj). 101 p., Presses Universitaires de France, séries "Que sais-je?", Paris

Géczy Barnabás (1981). *Lamarck és Darwin*. (Lamarcko kaj Darvino). – 171 p, Magvető, Budapest

Koch Sándor (1995). *Teremtés és evolúció*. (Kreado kaj evolucio). – *Természet Világa* 1995/1 különszám, 2-4, Budapest

Laporte, Léo F. (1966). *Darwin the Geologist*. (Darvino la geologo). – *GSA Today*, Dec. 1966

Teres Ágoston S.J. (2007). *A fejlődélmélet története, alapvető fogalmai és kérdései*. (Historio, bazaj nocioj kaj demandoj de la evoluci-teorio.) – *Manréza Szimpózium 2006: A fejlődélmélet és a Földön kívüli élet kérdése*. – Kairosz Kiadó, Budapest 2007

Vida Gábor (red., 1981-1985). *Evolúció, I – V*. Natura, Budapest

Adreso de la aŭtoro

Prof. D-ro DUDICH Endre

Károlyi M. u. 14/b

HU – 1053 Budapest / HUNGARIO

<dudich@t-online.hu>

Priaŭtoro informo

Geologo kaj biologo, profesoro pri geologio ĉe la Okcidenthungaria Universitato en *Sopron*. Honora prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio (HEA) kaj honora membro de Universala Esperanto-Asocio (UEA), Asoc. Prof. de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS).

Vivo por sovaĝbestoj

– 100-a naskiĝdatreveno de Prof. D-ro Bernhard Grzimek –


Rüdiger SACHS

Enkonduko

Sian vivon *Bernhard Grzimek* (Bernardo Gjimeko) dediĉis al la savado de sovaĝaj bestoj.

Por sia filmo "Serengetio nepre ne mortu" li ricevis en 1960 la honorigan internacian "Oskaro"-filmpremion.

Per sia televid-elsendaĵo "Vivospaco por bestoj" li fine fariĝis TV-legendo, kiu ilustre klarigis kaj klare montris al tuta generacio la belcon de la naturo kaj la gravecon de ties konservado.



Bildo 1: *Bernhard Grzimek* (1909 – 1987)

La juna veterinaro

Bernardo Gĵimeko naskiĝis en la suprasilezia urbeto *Neisse* ĉe la pola landlimo (hodiaŭ: *Nysa*, Pollando) – pro tio la por germanoj nur malfacile elparolebla famili-nomo – kaj studis veterinaran medicinon. Kiel freŝa bestkuracisto li jam profilis sin kiel spertulo pri kokinaj ovoj kaj per la eldono de “Kompendio pri kortbirdaj malsanoj”, kiu libro eldoniĝis en 1936 kaj vendiĝis ĝis la 1960-aj jaroj. Kaj sian sci-volemon pri sovaĝaj bestoj la kuraĝa veterinaro kontentigis en cirko: li demandis dresiston de rabobestoj, ĉu li povus studi la konduton de tigroj mem agante kiel dresisto. Estis lia unua kontakto kun ekzotaj grandkatoj, haŭtproksima...

Post la fino de la dua mondmilito li transprenis, en Frankfurto ĉe Majno (Germanujo), la direktorecon de la per elarea bombardado preskaŭ tute detruita zoologia ĝardeno, kiun li rapide restarigis kaj ekpisis per bestoj kun granda sukceso. *Bernhard Grzimek* estis viziulo kaj antaŭpensulo por naturprotektado, multaj el liaj ideoj hodiaŭ estas pli ol iam antaŭe aktualaj. Per siaj televidelsendoj li entuziasmigis tutan generacion por animaloj kaj kolektis milionojn por la projekt-laboroj de la Zoologia Societo Frankfurto. Kun tiu ĉi institucio la Gĵimeka vivoverko ankoraŭ hodiaŭ pluekzistas.

Sopiro al Afriko

Ju pli intense li etologie observis la bestojn en iliaj nenaturaj “zoo-hejmoj”, des pli grandiĝis la sopiro de Gĵimeko al Afriko kun klara intenco: se oni tenas en kaptiteco milojn da bestoj, oni ja devas rompi al si la kapon kaj cerbumi pri la demando, kiel ĝuste anstataŭigi al ili la forprenitan liberecon. Sed kiel aspektas la vivo de afrikaj sovaĝbestoj sub libera ĉielo kaj natura vivo en ilia tropika hejmlando? Por ricevi respondon al tiu scivolem-arda demando, li komence de la 1956-aj jaroj veturis al Afriko – vojaĝo, kiu ŝanĝis lian tutan vivon.

Krio pro helpo por la sovaĝaj bestoj

Pri siaj vojaĝimpresoj kaj situaci-pripensoj Gĵimeko partoprenigis la spektantojn de siaj televidaj elsendaĵoj “Vivospaco por bestoj”. La elstaraj bildoj el la fora Afriko entuziasmigis milion-publikaron. Je la fino de ĉiu elsendaĵo, en kiu li preskaŭ ĉiam trovis la guston de la spektantoj, li kun granda sukceso petis monodonadon cele al besto-protektado. Kiam oni volis malpligrandigi la Nacian Parkon “Serengetio” – herbokovrita savano en la nordo de Tanzanio – kaj pro tio riskis la morton de multaj diversspecaj sovaĝbestoj, Gĵimeko sonor-

igis alarmsonorilon: kun sia filo Miĥaelo li publikigis en 1956 libron kaj filmon, kies titoloj “Neniu spaco por sovaĝaj bestoj” aludis liajn antaŭajn televid-elsendojn. La enspezoj ebligis al la du bestoprotektantoj lanĉi inventad-laboron pri la sovaĝejoj gregoj de antilopoj, speciale de la gnuoj kaj zebroj, laŭ la devizo, ke oni povas protekti la sovaĝajn bestojn de Serengetio nur, se oni scias, kien ili migras dum la grandaj laŭsezonaj migradoj.

La Gĵimekoj “metas sin en la aeron”

Por fidiinde esplori la sovaĝbestojn, la du Gĵimekoj “enaeriĝis” per sia fama zebrostriita aeroplano kaj nombris la ĉeestantajn bestojn el la birdoperspektivo – tute nova metodo en prisovaĝbesta esplorado. La rezulto ŝokis kaj teruris – la fakta bestohavaĵo en Serengetio estis nur triono de la supozita bestonombro.



Bildo 2: Mondofamaj estas la bildoj, kiel la du Gĵimekoj en la zebrostriita *Dornier-27*-flugmaŝino – de ambaŭ ame nomata “anaso” – transflugis la orientafrican savanon por nombri la sovaĝbestojn kaj informiĝi pri iliaj migrad-itineroj

Por la filmo ili faris spektakloriĉajn scenojn. Kvankam la filo Miĥaelo ĵus post la finaj filmaktivadoj mortis pro aeroplana akcidento, profesoro *Grzimek* daŭrigis la laboron kaj finis en 1959 tiun gravan



Bildo 3: Patro kaj filo *Grzimek* ekkonis, ke malgrandiĝo de la Nacia Parko grave damaĝus la sezonan migradon de la gnuoj kaj kondukus al detruo de la Serengeti-ekosistemo kaj ties sovaĝbestaro.

(Grase punktita areo: sovaĝbesta paŝtigado dum la pluva sezono de novembro/decembro ĝis majo; malgrasaj punktoj: gregara vivejo dum la senpluva seka sezono de junio ĝis oktobro).

Kiam la pluvsezona vegetaĵo por la grandaj parhufuloj kaj zebroj perdas sian nutrovaloron, komenciĝas (en majo/junio) ĝenerala moviĝo for de la ebenaĵo (grase punktita). Kun intensiĝo de la sekeco la populacioj migradas okcidenten en la direkto al la Lago Viktorio, kie troviĝas daŭra akvo kaj okazas pluvetoj. Fine de la seka sezono (en julio) la plej granda parto de la migraj bestoj estas atinginta la nordan regionon *Masaj-Mara* ĉe la landlimo inter Tanzanio kaj Kenjo (malgrase punktita).

Evidentiĝas, ke la naciaparkaj limoj (kiuj ja estas nur surmape virtualaj, ne materie realaj per muro, dratbarilo aŭ foso) ne estas nevenkebla malhelpaĵo por migradaj sovaĝbestoj: ili transiras en farmbienajn regionojn kaj la sekva sovaĝbesta/dombesta kontakto kondukas al gravaj konfliktoj prinutraĵaj kaj malsanokontaĝaj.

mejloŝtonon kadre de bestfilmo. La unika verko fascinis la spektantojn en la tuta mondo kaj fakte kreis novan medio- kaj naturprotekt-konscion de tuta generacio.

Fondinto de serengetia esplor-instituto

La filmo – fakte la unua tiuspeca dokumentaĵo pri la afrika sovaĝbestaro kaj poste premiita per pluraj distingoj – estis la rezulto de multjaraj studoj pri la migrado de gnuoj, kalkulado kaj registrado de sovaĝaj bestoj en difinita regiono kaj pristudado de koneksaj biologiaj problemoj. Por la memoro de sia mortinta filo, Gjimeko konstruigis meze de Serengetio esplorcentron en *Banagi* (17 km norde de la turisma kampadejo *Seronera*) kiel bazan laborlokon por biologoj (vd. la mapon en p. 219). La “*Michael Grzimek Rememor-Laboratorio*” aŭ “*Serengeti-Esplor-Projekto*” – nun oficiale konata kiel “*Serengetia Reserĉad-Instituto*” (SRI) – havas la taskon daŭrigi la laboron de la du Gjimekoj kaj studi la ekologion de la grandaj mamuloj kaj ties biotopoj, kaj kolekti informojn necesajn kiel bazon por la konservado kaj manaĝerado de la Serengetia Nacia Parko en Tanzanio.



Bildo 4: La prezidento de Tanzanio, d-ro *Julius Nyerere*, diskutas kun sciencistoj antaŭ la nova “*Michael Grzimek Memorial Laboratory*” pri la diversaj esplorfakoj meze de la Nacia Parko Serengetio de maldekstre: d-ro *Klingel* (DE): zebroj, d-ro *Talbot* (US): gnuoj, d-ro *Nyerere* kaj d-ro *Verschuuren* (BE): antilopoj) (Fotis d-ro *R. Sachs*)

Ekde sia komenco, la Projekto estis difinita kiel internacia kaj multfaka entrepreno. Tiu ĉi koncepto, lanĉita de la brita direktoro de la Parko *John Owen*, ricevis financan subtenon de FAO de UN, de la

Federacio de Germanio kaj de la usonaj *Nuffield Foundation*, *Welcome Trust*, *New York Zoological Society*, kaj ankaŭ de la nederlanda Federacio pri Antaŭenigo de Tropikaj Esploroj. Tiuj kaj aliaj institucioj en Eŭropo kaj Usono, kies intereskampoj estis speciale aplikeblaj por la intencitaj esploradaj programoj en Serengetio, sukcesis akiri plej kapablajn sciencistojn – kaj la bezonatan monon por la planitaj esplorkomunikaĵoj.

En 1966 eblis larĝigi kaj plivastigi la projekton danke al donaco de la usona *Ford*-fondaĵo, kiu subtene reagis al la petoj de famaj sciencistoj *Niko Tinbergen* (profesoro ĉe *Oxford University*) kaj prof. *Konrad Lorenz* (estro de Maks-Plank-Instituto pri Etologio en *Seewiesen*, Germanujo). Tiuj institucioj trovis inter siaj studentoj kelkajn zoolojn interesitajn veni al Tanzanio kaj subteni la tie jam laborantajn sciencistojn.

Kunfondinto de naturprotektata asocio

Sian famecon Bernardo Gjimeko uzis por la bestoprotektado. Dum tio la simpatia zoo-direktoro kelkafoje intence provokis per ruzadoj: li ekzemple akiris enir-rajton en amasbestejoj kaj poste kaŭzis skandalon pro la rezultantaj fotoj. En la jaro 1979 li fondis, kune kun aliaj medioprotektantoj, la Asocion por Medio kaj Naturprotektado Germanio *BUND* ("*Bund für Umwelt und Naturschutz Deutschland*").

Liaj ideoj pluefikas en multaj projektoj – inter tiuj aparte la pluekzistado de la grandaj Naciaj Parkoj en Afriko – kiuj helpas sekurigi la postvivadon de la unika afrika bestomondo. Liaj televidprezentadoj estas neforgeseblaj, en kiuj li ĉiam kunprenis best(et)on el la Frankfurta zooparko, kiu sciavide kaj explorele surgrimpis lin dum lia parolado (Bildo 1). *Bernhard Grzimek* mortis la 13-an de marto 1987 ĉe cirkovizito en Frankfurto – precize en prezentado de la cirka tigoprogramero.

Adreso de la aŭtoro

Prof. Dr. Rüdiger SACHS

Vor dem Brückentor 3

DE – 37269 – Eschwege / Germanio

<isaesachs@aol.com>

Priaŭtoro informo

Bestkuracisto. Laboris kiel parazitologo ĉe la serengetia *Michael-Grzimek*-Esplorlaboratorio en Tanzanio dum kvarjara periodo.

Rememoroj pri *Bernhard Grzimek*

Harald SCHLIEMANN

En tiu ĉi jaro 2009, je la naskiĝdato, la 24-a de aprilo, *Bernhard Grzimek* fariĝus centjara. Multaj homoj certe honore rememoris lin kaj omaĝe aprezis liajn nekompareblajn meritojn por la protektado kaj konservado de la naturo – sed nur malmultaj homoj kapablas vidi, malantaŭ la aktiva iniciatinto kaj antaŭpensanta organizanto pri medio- kaj naturprotektado, la veran homon.

Mi renkontiĝis persone kun prof. Gjimeko la unuan fojon en 1965 kaj tiam nur interesiĝis pri liaj tanzaniaj aktivadoj: ĉar post mia parola doktoriĝekzameno ĉe la Hamburga Universitato mi intencis fari kvarmonatan vojaĝon al Kenjo kaj Tanzanio por kolekti zoologian materialon. Profesorino *Henriette Oboussier*, mia doktoriĝ-patrino, interesiĝis science pri antilopoj, iliaj parencaj rilatoj, iliaj cerbostrukturoj kaj hipofizoj – sed krom la sciencaĵoj antaŭ ĉio pri la afrika kontinento mem.

En Najrobo/Kenjo ni havis fiksan lokon, nome la Instituton pri Veterinarmedicino, fonditan de prof. *R.R. Hofmann*, en kiu ni povis stoki la kolektitan materialon: skeletojn, haŭtojn kaj felojn, cerbojn. Dum vizito de la Instituto pri Anatomio mi hazarde renkontis profesoron *Grzimek*, kiu ĵus vizitis la saman instituton. La granda, bonvolema, meritoplena Gjimeko – post reciproka prezentado – ridetis “de supre” (pli ol 1,90 m altstatura!) sur min kaj tuj turniĝis al alia vizitantogrupo. Min treege impresis la afabla vizaĝo de la famulo – li, kompreneble, poste ne plu povis memori la junan biologon renkontitan en Najrobo.

Gjimeka projekto en Serengetio

La sekva kontakto kun Gjimeko estis nereka, tamen de plej alta graveco. Nia zoologia kolektovojaĝo kondukis nin en Serengetion, por kiu prof. *Oboussier* jam longe antaŭe estis planinta kaj aranĝinta la necesajn kontaktojn, ĉi-foje kun nia faka garantianto d-ro *R.Sachs*. Nia serengetisperta patrono estis veterinaro kaj samtempe entuziasma biologo kun granda intereso pri scienca fundamenta esploro. Post multjara laboro en Namibio li sukcese aliĝis al la “Serengetia Esplor-